

ԿԱՎԿԱԶԱ **ESPERANTISTA**

ՄԱՍԿԱՆԻՆԻ ԿՈՂԵԿ

ԿԱՎԿԱՅԻՆ ԵՍՊԵՐԱՆՏԻՍՏ

Двуязычный журнал. Երկու լեզուով. Երկու լեզուով.

№ 8

1910 թ.

I J A R O

1/14 de Julio.

«ԿԱՎԿԱԶԱ ԵՍՊԵՐԱՆՏԻՍՏ»

Կարձոն 1 rublo—1,06 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub., 1/2 pĝ.—
—3 r. 1/4 pĝ.—1 r. 50 kop., 1/8 pĝ.—
—75 k., 1/10—50 k.

Adresoj de samideanoj 10 k.
Adreso: Tiflis, Panaseviča str. № 1 Aĵk
Ter-Astvacatricane.

«НАВКАЗСКИЙ ЭСПЕРАНТИСТЪ»

Во тоѣ 1 рубль. Объявления: страница—
6 руб.; 1/2 стр.—3 р., 1/4 стр.—1 р. 50 к.,
1/8 стр.—75 к., 1/10 стр.—50 к.

Адресъ: Тифлисъ, Панасевича ул. № 1
Аѣкы Теръ-Астѣацатриацу.

«ԿՈՂԵԿԱՆ ԵՍՊԵՐԱՆՏԻՍՏ»

Տարեկան բաժանորդագիրը 1 ռուբլի:

«ԿԱՎԿԱՅԻՆ ԵՍՊԵՐԱՆՏԻՍՏ»

Գլխավորումը 1 թիվում.

Редакция открыта ежедневно по вечерамъ
отъ 6—7 ч.



La prezidantino de «La Societo Esperantista Kavkaz» F-no P. PAVLOVA.

Российскія и Заграничныя объявленія
за мѣсто, занимаемое строкой петита
передъ текстомъ 20 коп., послѣ тек-
ста 10 коп.

Г. г. подписчикамъ г. Батума

Лица, подписавшіяся у г. С. Мерт-
циана, съ 9 номера журналъ могутъ по-
лучать въ магазинѣ г. Сурена Суренян-
ца, противъ армянской церкви, на Дон-
дук-Корсаковской улицѣ.

Բարև ձեռքով զ ձեր բաժանորդներին:

Այն բաժանորդները, որոնք գրուել են
պ. Ս. Մկրտչեանի միջոցով, № 9-ից թի-
թը կարող են ստանալ պ. Սուրէն Սու-
րենյանի խանութից, որ գտնուում է Դոն-
դուկ-Կորսակովսկայա փողոցում, հայոց
եկեղեցու դիմացը:



RUGAJ ROZOJ

Frumatene

Mi eniris en ĝardenon,
Kie rozoj, ruĝaj rozoj
Brulis plenaj de la rosoj.

Por dormeto

Plin Inlis la venteto;—
Ekvekiĝis do la rozoj
Kaj elverŝis larmorosojn.

Brilante

Larmoj tiuj jen brilante,
Kiel jngo de l' sufero,
Falis peze sur la teron...

Ĉu do vere

Ĉi ploras malespere;
Ĉu do ankaŭ ili havas
La ĉagrenon mortohavan?

Ne!—salutas
Tiel ili de l' sun' ludon,
Ĝojas je la ĉielruĝo;—
Rozoj belaj, rozoj ruĝaj.

Ŝrind



N A Z O

De Gogol

I

25-an de marto en Peterburgo (la ĉe-
furbo de Rusujo) okazis eksterordinare
stranga fariĝo. Barbiro Johano Jakovle-
viĉ, loĝanta sur la Voznesenskij pros-
pekto, (lia herednomo estas perdita; eĉ
sur lia elpendaĵo,—kie estas figurita unu
sinjoro kun ŝapumita vango kaj kun li—
subskribo: «ĉi-tie oni lasas eĉ sangon»,
nenio plu estis skribita,) vekigis sufiĉe
frue kaj eksentis odoron de ĵus elbakita
varmega pano. Ete leviginte sur sia
lito li ekvidis, ke lia edzino, sufiĉe res-
pektinda sinjorino, kiu trege amis la
kafon, elprenadis el la forno nove elba-
kitajn panojn.

«Mi hodiaŭ, Praskovja Osipovna, ne
trinkos la kafon» diris Johano Jakovle-
viĉ: «kaj anstataŭ ĝi mi tre volas manĝi
varmegan panon kun ajlo.» (T. e. ke
Johano Jakovleviĉ tre volus ilin ambaŭ
manĝi, sed sciis, ke postuli kune du
objektojn estas tute ne eble, ĉar lia ed-
zino Praskovja Osipovna ne amis tiasa-
majn kapricojn).

„Nu manĝu mia edzo, malsaĝulo, la
panon, ĉar por mi ja estos pli bone“,
pensis la edzino: „por mi restos unu
plia porcio da kafo,“ kaj ŝi ŝetis al la
edzo unu panon sur la tablon.

Johano Jakovleviĉ nur por la konveno
vestis super la ĉemizoj unu frakon kaj,
sidiginte antaŭ la tablo, li surŝutis sa-
lon, preparis du pecojn de ajlo, prenis

en manojn tranĉilon kaj, farinte tre seriozan mienon, komencis tranĉadi la pannon. Tranĉinte la pannon je du duonoj, li ekrigardis en ĝian internon—kaj, al sia mirego, li ekvidis tie ion blankiĝantan. Johano Jakovleviĉ puŝis ĝin per la tranĉilo, kaj poste palpis per la fingro: „Ĝi estas tre malmola!“ Li enigis tien la fingrojn kaj eligis—nazon!... Johano Jakovleviĉ tiel ekmirigis, ke eĉ siajn manojn pendigis; li komencis froti siajn okulojn kaj palpi la eligitan objekton: nazo, certe, nazo! kaj al tio, al li ŝajnis, ke ĝi estas de iu konata sinjoro. Lia vizaĝo jam prezentis ion teruran. Sed tiu—ĉi teruro, kompare kun indigno de lia edzino, prezentis preskaŭ nenion. „Kie do vi, besto, detranĉis ĉi tiun nazon?“ ekkriis ŝi je li kolerante, „fripono! drinkulo! mi mem denuncos pri via farajo al polico. Ho, kia rabisto vi estas? Mi mem jam ekaŭdis de tri personoj, ke vi dum razado tiel pinĉas la nazojn, ke ili apenaŭ restas sur siaj lokoj!“

Sed Johano Jakovleviĉ jam estis nek vivanta, nek mortinta: li ekkonis, ke ĉi—tiu nazo apartenis al kolegia asero Kovalev. kiun li razis ĉiun merkredon kaj dimanĉon.

«Atendu, Praskovja Osipovna! diris fine Johano, mi envolvos la nazon en ĉifonajon kaj metos en anguleton:—estu ĝi tie tempe; sed poste mi ĝin nepre ien forportos.» „Mi ne volas eĉ aŭdi! respondis la edzino. Nu, ĉu estas eble, ke mi permesu al mi mem doni rajton al la detranĉita nazo, kuŝi en mia ĉambro!... Ho, vi bruligita sekajo! Vi nur scias akriĝi la razilon, sed vian metion vi baldaŭ eĉ povas forgesi;—ho, kanajlo! Nu, ĉu estas efektive, ke mi respondu al polico pro vi?... Ho, vi malpurigisto, sentaŭgulo! Forportu la nazon, la nazon! vi malsaĝa trabo. Forportu ĝin kien vi volas, sed ne restigu ĝin en mia domo!“

Johano Jakovleviĉ staris kvazaŭ tute mortigita. Li pensis, pensis—sed ne sciis—kion pensi. «La diablo nur scias, kiamaniere ĉi—tio okazis kun mi,“ diris fine Johano jukinte per mano post la orelo: «eble mi hieraŭ revenis hejmen ebria, aŭ ne, ne—mi ne povas nun diri ion je l' trafo... Sed laŭ ĉiuj rimarkiloj, ĉi—tiu okazaĵo devas esti malefektivigita, ĉar la pano—estas—bakita afero, sed la nazo—estas—tute alia afero. Diablo prenu, mi tute nenion komprenas!».

Johano Jakovleviĉ eksilentis. Unu penso pri tio, ke policanoj, trovinte en lia domo la nazon povas lin akuzi en malbonfarajo, alkondukis Johanon en ian furiozajon. Al li jam ŝajnis ruĝa kravato, belege brodita per arĝento, spado... kaj li tremis tuta sia korpe. Fine li prenis por si la veston kaj botojn, vestis ĉi—tiun abomenaĵon kaj kondukata per malfacilaj admonoj de Praskovja Osipovna, li envolvis la nazon en ĉifonajon kaj eliris sur la straton. Li volis ien eniĝi, enŝovi la nazon: aŭ sub pordegojn, aŭ iamaniere ĝin faligi, kvazaŭ li neintence ĝin perdis,—kaj poste rapidege foriri. Sed, kvazaŭ je l'malfeliĉo al li ĉiam renkontadis iu lia konatulo, kiu tuj lin demandis: „Kien vi iras?“ aŭ „Kiun vi tiel frue ekvolis razi?“ k. t. p. tiel, ke Johano Jakovleviĉ neniel povis trovi liberan minuton. Unu fojon li kvazaŭ tute perdis sian pakajon, sed policano ankoraŭ jam de malproksime rimarkis ĉi—tion, kaj montrante per halebardo diris al Johano: «Jen, vi tie ion perdis, prenu perditon!..» kaj Johano Jakovleviĉ estis devigita preni la nazon kaj meti en sian poŝon. Malespero ekregis lin plie, ĉar la popolo, sendese multobliganta sur la strato pro la malfermiĝado de magazenoj, kaj butikoj, malhelpis al li plenumi sian deziregan taskon. Johano Jakovleviĉ de cidis iri al Isakievskij ponto: ĉu ne prosperos al li ĵeti iamaniere en la riveron Neva la nazon?...

Sed mi iomete estas kulpa pro tio, ke mi ĝis nuna tempo nenion diris pri Johano Jakovleviĉ, pri ĉi-tiu honorinda kaj estiminda homo en ĉiuj rilatoj... Johano Jakovleviĉ, kiel ĉiu konvenema rusa metiisto, estis granda drinkulo kaj malgraŭ tio, ke li ĉiutage razis fremdajn mentonojn, lia propra mentono preskaŭ ĉiam estis ne razita. La frako de Johano Jakovleviĉ (Johano neniam vestis la surtuton), estis pigkolora, t. e., ĝi estis nigra, sed tute en cinamflavaj kaj grizaj pomoj; lia kolumo polurigis, kaj anstataŭ tri butonoj—sur ĝi nur pendis fadenoj. Johano Jakovleviĉ estis granda cinikulo,—kaj kiam kolegia asessoro Kovalev ordinaro diradis al li dum razado: «Ĉe vi, Johano Jakovleviĉ eterne malbonodoras la manojn!» tiam Johano Jakovleviĉ respondadis je ĉi-tio demande: «Kial al ili malbonodoru?»

—«Mi ne scias, frato, rediradis Kovalev, sed ili malbonodoras», kaj tiamaniere preskaŭ ĉiam disputis Kovalev kun barbiro Johano, kaj post ĉi-tiu disputo, Johano Jakovleviĉ, flarinte la tabakon, sapumis Kovalevon pro l'disputo ĉie, ĉe sub la vangoj,—post la oreloj kaj sub la barbo, entute ĉieloke, kie li nur ekvolus pro l'kolereto... Ĉi-tiu honorinda civitano jam sin trovis sur la Voznesenskij ponto. Li antaŭ ĉio ĉirkaŭrigardis, poste fleksiĝis sur la balustrado de l'ponto, kvazaŭ li rigardas sub la ponton, la riveron, ĉu multe da fiŝoj naĝas sur la rivero,—kaj trovinte bonan minuton por sia ago, li jetis kaŝe en la riveron la ĉifonaĵon kun la nazo. Li eksentis, ke de li kvazaŭ dek pudoj per unu fojo estis deŝargigitaj. Johano Jakovleviĉ eĉ ekridetis de l'ĝojo. Anstataŭ iri razi la oficistajn mentonojn, li iris en unu institucion kiu havis suskribon: „Manĝaĵo kaj teo“, por demandi unu glaŝon da punĉo, kaj subite li rimarkis en la fino de l'ponto kvartalestron, kun

nobla eksteraĵo, kun larĝaj vangharoj en triangula ĉapelo, kaj kun spado. Johano Jakovleviĉ preskaŭ svenis, kaj dum me la kvartalestro vokis lin per fingro—dirante: „A, aliru ĉi-tien, aminda!“

Johano Jakovleviĉ, sciante la etiketon, deprenis de malproksime la ĉapon kaj, alirinte rapidege, li diris al la kvartalestro: „Mi deziras al via moŝto bonan sanon!“

„Ne, ne, frato, ne moŝto,—sed diru do: kion vi faris tie, starante sur la ponto?“

„Je l' Dio, sinjoro, mi iris razi, kaj nur ekrigardis en la riveron, por ekscii, ĉu ĝi rapide fluas aŭ ne?“

„Mensogas vi, mensogas! Vi ne povas min tute trompi! Bonvolu do respondu en policejo.“

«Mi, mi, via moŝto, estas preta razi vian moŝton senkontraŭparolo, eĉ du fojojn semajne, respondis Johano Jakovleviĉ.»

«Ne, amiko, ĉi-tio nur estas sensencaĵo. Min tri barbiroj razas, kaj eĉ ili opinias, ke por ili ĉi-tio estas granda honoro... Sed bonvolu, diru do, kion vi tie faris?» Johano Jakovleviĉ, paliĝis...

Sed ĉi-tie la okazaĵo tute kovriĝas per nebulo, kaj, kio okazis plue, tute ne estas konata.

Elrusigis V. Gogitidze

(Daŭrigota).



SINCERA DONAĈO

V. Papazjan.

En la urbo vivis unu tre riĉa homo. Li estis tiom riĉa ke por li ne mankis oro kaj arĝento. Sed li de tio ĉi-neniam donis ioneton al la malzichaloj, li eĉ mem uzurpatis ilin malfelicigante multe da familioj,

Tagon, kiam li estis promenata, ren-

kontis lin diablo, kiu estis vestinta kiel princo. La riĉulo lin ne ekkonis, profunde sin klinis; kaj delikate demandis kiu li estas, kaj kial li estas veninta ilian urbon?

La princo, aŭ se vi deziras la diablo, modeste rigardis lin kaj diris.

—Kial vi demandas? kial respondi al vi?..

Tion ĉi deziras mi, diris la riĉulo, mi estas la plej riĉa homo ĉi tie, kaj mi povas malpermesi al vi fari eĉ unu paŝon.

—Bone, se tiel, sciu do ke mi estas diablo!

—Hm!... ektusis la riĉulo, efektive?.. kaj kial vi venis en nian urbon?

Kaj li komencis tremi...

—Hodiaŭ, diris la diablo, en via urbo estas foiro, kaj mi venis ricevi tiujn donacojn kiujn oni sincere donacos al mi.

—Tre bone, diris la riĉulo, tion ĉi mi ne malpermesos, sed vi permesu al mi amikiĝi kun vi, kaj vidi kiajn oni donos al vi "sincerajn donacojn".

—Mi estas konsenta. Iru!

Kaj ili ambaŭ iris al foiro. La riĉulo aĉetis du glasojn da vino, kaj donante la unu al la diablo diris:

—Prenu, jen kion mi donacas al vi el tuta kor sincere!

Sed diablo ne prenis, li ekkomprenis ke tio la riĉulo donacas pro rido aŭ pro timo.

En tiu sama minuto apud ili kuris unu vilaĝano kiu penis kapti lu kurantan bovinon,

Malfeliĉa vilaĝano tre laciĝis de kurado kaj ekkriis.

—He! Diablo prenu vin, malbenita bruto!

—Ĉu vi ekaŭdis, diris la riĉulo al la diablo, prenu, oni donacas tiun ĉi bovinon al vi.

—Ne, respondis la diablo, tio ĉi ne estas el kora, sincera; se mi prenos tiun bovinon, tiamaniere mi suferigos la vi-

laĝanon. Ne malproksime ili renkontis unu virinon kiu kriis:

—Diablo prenu vin! Ĉu ne estas sufiĉe petoli?

—Prenu! diris la riĉulo, ŝi donacas la knabon al vi.

—Ne, respondis la diablo, ne estas sincera!

La riĉulo kaj la diablo iris al la amaso; tie, du laboristoj interbatiĝis. Fine, unu el ili kiu estis tre ekscitita ekkriegis:

—Iru kun diablo! Jam estas sufiĉe!...

—Prenu tiun ĉi, jen donaco al vi, diris riĉulo.

—Ne, ne estas sincera, respondis la diablo, nun li estas tre ekscitigita, kaj se mi prenos lian kolegon, la unua enuanto estos li mem. Kaj tiel, ili pramenis jam longe, sed la diablo ankoraŭ ne trovis sinceran donacon, sed subite unu maljunulo kaj unu virino vestintaj elpecajn vestojn, haltigis la riĉulon kaj ekkriis.

—Estu vi malbenita! Vi ja estas riĉiĝinta per nia ŝvito, ĉu ne estas sufiĉe? Ĉis kiam ni devas suferi? Vi forprenis nian la plej lastan esperon—nian bovinon; vi ne havas bedaŭron, restigas sen la pano la familiojn! Diablo forprenu vin!

Kaj kiam la riĉulo pretiĝis koleri, la diablo ekkaptis lian gorĝon kaj diris:

—Jen fine unu sincera donaco, kiun oni donas kore, kun plena deziro, kaj mi kun vera plezuro akceptas ĝin....

Li diris tion ĉi kaj malaperis kun riĉulo.

El armena lingvo esperantista

Tiros Tiroŝjan



LA SESA

INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTO

WASHINGTON, U. S. A.

14a—20a Aŭgusto, 1910

UNUA CIRKULERO

La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Washington, D. C. (Distrikto de Kolumbio), la kapitulo de Usono, de la 14a ĝis la 20a de Aŭgusto, 1910a.

Tia anonco mem devus sufiĉe certigi al vi ke LA SESA superos ĉiun antaŭan kongreson, ĉar la amerikanoj estas famaj pro sia maniero por fari aferojn, kaj oni povas konfidi je la usonanoj por fari la venontan kongreson la plej sukcesplena el ĉiuj.

Oni klopodas por aranĝi grandan laŭdindan kongreson, kaj la Organiza Komitato, kiu kontrolas ĉiun detalon de la laborado, konsistas el zorge elektitaj gesinjoroj, kiuj estas bonekonataj pro siaj specialaj kapabloj, kaj ankaŭ pro sia entuziasmo pri la Internacia Lingvo Esperanto.

Inter la komitatanoj troviĝas la jenaj: John Barrett, Direktoro de la Internacia Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, kaj Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko.

Edwin C. Reed, Ĝenerala Sekretario-Kasisto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, Sekretario-Adjunkto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, Sekretario de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso.

Kolonelo Robert N. Harper, Prezidanto de la «District National Bank», membro de la Washington'a Ĉambro de Komercio, Kasisto de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso.

Pr-o W. J. Spillmān, el la Usona Departemento Agrikultura, Prezidanto de la Aga Komitato de la Esperantista Asocio

de Norda Ameriko, Prezidanto de la Sesa Kongreso.

William F. Gude, Prezidanto de la Washington'a Ĉambro de Komercio, prezidanto de la Esperantista Federacio de la Distrikto de Kolumbio.

D-ro Ivy Kellerman-Reed, Prezidanto de la Ekzamena Komitato de la Esperantisia Asocio de Norda Ameriko. Prezidanto de la Komitato pri la Kongresa Konkurso Literatura.

I. B. I. Evans, Sekretario-Kasisto de la Esperantista Federacio de la Distrikto de Kolumbio, Helpa Sekretario de la Organiza Komitato de la Sesa Kongreso.

Kaj la Prezidantoj de la specialaj Komitatoj pri anoncado, gvidlibroj, kunvenejoj, memorajoj, kunvenoj sekciaj, ekskursoj, amuzado, loĝado, eksperimentoj de la ruĝa kruco, basbalo, transportado, Diservoj, k. t. p.

Kongreskartoj. La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedantojn en la diversajn kunsidojn, amuzajojn, k. t. p., oni povas nun aĉeti po kvin dolaroj (dek spesmiloj). Al ĉiu ĉeestanto de la kongreso, kiu venos el iu alia parto de la mondo el Norda Ameriko, la kasisto repagos la sumon de du dolaroj kaj duono (kvin spesmiloj). Al ĉiu kongresano el Norda Ameriko estos rabato de unu dolaro (du spesmiloj) kondiĉe ke la kartoj estas aĉetita antaŭ la unua de junio. Oni devas mendi sian kongreskarton de la Sekretario (ĉe la adreso ŝube) aŭ de la Centra Oficejo Esperantista, 51, rue de Glichy, Paris.

Loĝado. La komitato pri loĝado jam klopodas por speciala rabatprezo al kongresanoj. Washington estas fama pro sia gastemeco al vizitantoj. Ordinare oni povas loĝi en unuaklasa hotelo po du aŭ tri dolaroj (kvar aŭ ses spesmiloj) por unu tago, ricevante kaj loĝadon kaj manĝadon: kaj oni povas ricevi bonan loĝadon kaj manĝadon po ses aŭ ok do-

laroj (dekdu aŭ dek ses spesmiloj) por unu semajno.

T r a n s p o r t a d o. Ĉar ni tute ne povis lui en Usono ŝipon por la veturo de la Eŭropaj Esperantistoj, kiel oni sugestis, kaj ne povas aranĝi rabaton ĉar la ĉefoficejoj de la ŝipkompanioj estas en Eŭropo, la Organiza Komitato petis ke la Centra Oficejo Esperantista kaj la Universala Esperanto-Asocio aranĝu la vojaĝon, kaj anoncu planojn kaj koston en la Esperantistaj ĵurnaloj de Eŭropo. Ni povas certigi ke la kosto de Eŭropo ĝis Nov-Jorko duaklase, kiu estas sufiĉe luksa, estos proksimume kvindek dolaroj (cent spesmiloj). De Nov-Jorko ĝis Washington unuaklase kostas ordinare kvin dolarojn (dek spesmilojn) kaj rabato estos aranĝita por la kongresanoj.

B a s b a l o Same kiel oni pensas pri Hispanujo, kiam oni aŭdas ion pri la konkurso de la toroj, same kiel ĉies pensoj sin turnas al Svislando, kiam oni parolas pri montsportoj, kaj al Anglujo kiam oni parolas pri «cricket», tiamaniere oni nepre pensas pri Usono, kiam ni nomas basbalon, la «Grandan Amerikan Ludon». En la daŭro de la kongresa semajno, okazos konkursoj de la «American Baseball League» (beshol lig), kiu enhavas la plej lertajn ludantojn el ĉiu parto de ĉi tiu kontinento. Amatoraj konkursoj inter lokaj ludantoj ankaŭ okazos. Usonaj Esperantistoj ĉeestos kaj klarigos la ludon al la kongresanoj.

A k c e p t a d o. Washington'aj Esperantistoj, portante insignojn Esperantajn, ĉeestos ĉe la stadiono por renkonti vin kaj instrui vin pri la vojo, k. t. p. Por zorgi pri la kongresanoj el Eŭropo, speciala komitato Nov-Jorka iros por renkonti ĉiun vaporsipon sur kiu ni scias ke Esperantistoj venas, kaj se iuj Eŭropaj Esperantistoj sciigos vin ke ili venos al Boston aŭ alia haveno, ni aranĝos iliaŭ akceptadon.

E k s k u r s o j. Krom postkongresaj ekskursoj, pri kiuj oni nun ne povas plene sciigi, ni aranĝos grupojn por viziti la multnombrajn belajn konstruaĵojn, parkojn, k. t. p., en kaj proksime de la urbo. El tiuj ĉi Washington havas pli multajn kaj pli belajn, kvankam ne tiel malnovajn, ol iu ajn alia urbo en la mondo. Ĉi tiuj grup ekskursoj estos kondukataj de lokaj Esperantistoj.

P o ŝ t k a r t o j. La komitato jam eldonis specialajn poŝtkartojn de Washington'aj vidindaĵoj portantaj plenan priskribajon Esperante presitan. Ĉi tiujn oni povas mendi de la Sekretario po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por dek kvin poŝtkartoj. La Sesa Kongreso ricevas la profiton.

K o n g r e s m a r k o j. La komitato jam eldonis tre belajn kongresmarkojn, kiujn oni povas mendi de la Sekretario po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj. La Sesa Kongreso ricevas la profiton.

L i t e r a t u r a K o n k u r s o. La dua Kongresa Literatura Konkurso okazos (kiel la unua en 1909a, tiel sukcese okazinta en Barcelono) iam en la daŭro de la Kongresa semajno. Ĉiuj personoj, societoj, redakcioj, k. t. p., kiuj bonvolos proponi temojn kaj doni premiojn, estas urĝe petataj ne nur detale informi la prezidanton de la komitato (D-ro Ivy Kellerman-Reed, The Lamont, Washington) aŭ la Sekretarion de la Organiza Komitato, sed ankaŭ samtempe publike anonci per gazetoj, k. t. p., ke tiaj temoj kaj premioj estas proponitaj al la komitato. Se specialaj juĝantoj estas postulataj, bonvole anoncu tion, kune kun la nomoj kaj adresoj de la specialaj juĝantoj elektitaj. Ĉiu manuskripto juĝota de la Kongresaj Juĝantoj devos esti ricevita en Washington antaŭ la 1-a de Julio, 1910a. La Organiza Komitato proponas la jenajn temojn kaj donacos medalojn al la premiitoj:

1. Por la plej bona prozaĵo (de 1000-2000 vortoj) pri Universala Frateco.

2. Por la plej bona poezio (de 25-50 linioj) pri Universala Frateco.

3. Por la plej bona rakonto (prozaĵo originala de 2500-3000 vortoj).

4. Por la plej bona rakonto (prozaĵo originala de 2500-3000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de dek kvin kaj dudek jaroj.

Aliaj temoj kaj premioj, kaj ankaŭ la reguloj de la konkurso, estos anoncataj en sekvontaj cirkuleroj, kiujn la Sekretario sendos al iu, kiu sendas la nomon, adrosan kaj poŝtmarkon (aŭ respondkuponon).

La Urbo Washington.

Washington estas unu el la plej belaj urboj en la mondo, enhavante proksimume tricent mil loĝantojn, kaj estas fama pro sia pureco, larĝaj stratoj kaj aleoj, multegaj arboj, belaj parkoj, majestaj konstruaĵoj el marmoro kaj granito, multaj lokoj interesaj, inter kiuj estas la Blanka Domo, kiu estas la loĝejo de la Usona Prezidanto; la Kapitulo, kie kunvenas la Usona Kongreso; la Biblioteko de Kongreso, la plej bela kaj granda en la mondo; la Monumento de Washington, 171 metrojn alta, kiu estas la plej alta masonaĵo en la mondo, kaj havas interne rapidan elevatoron, kiu portas la pasaĝerojn ĝis la alteco de 155 metrojn; la Nacia Trezorejo kun ĝiaj grandaj kasejoj; belegaj konstruaĵoj de la registaraj departementoj; la Corcoran (korkoran) Galerio de la Arto; la Smithsonian'a, Nacia, kaj Kuracarta Muzeoj; Botanikaj Ĝardenoj; Zoologia Parko; k. t. p.; en ĉiujn ĉi la enirado estas senpaga.

Aŭgusto estas nomata en Washington la «Monato Turista», ĉar ordinare estas tiam pli multe de vizitantoj ol en iu ajn alia sezono de la jaro. La vetero dum

aŭgusto estas modere varma, la vesperoj estas malvarmetaj kaj refreŝigaj. Estos multaj plezuroj, ekzemple, ekskursoj lunlumaj al la Grandaj Akvofaloj de la Potomac (potomak) Rivero, al Glen Echo (glen eko), al Chevy Chase (ĉevi ĉeĵs) Lago, k. t. p., kaj veturadoj laŭ la bela Potomac Rivero per boatoj provizitaj je muziko, dancado, manĝetoj, kaj aliaj amuzoj por la pasaĝeroj.

Ekskursoj estos aranĝitaj al Mount Vernon (maŭnt vernon), la originala domo kaj tombo de George Washington, kie oni povas vidi la meblaron, k. t. p., kiun li uzis dum sia vivo, ĝuste kiel ili estis antaŭ cent kvindek jaroj; al Arlington Cemetery; al Chesapeake Beach (ĉesapik biĉ) Cabin John Bridge (kabin ĝon briĝ), kiu estas la plej longa ŝtonarko en la mondo, Alexandria (alekzandria), la Nacia Hejmo por maljunaj soldatoj, Militŝipa Haveno, k. t. p. Je distanco de nur unu horo de Washington oni povas ĝui bonegan salakvan banadon.

Survoje al Washington.

Sendube la plimulto de la Eŭropaj Esperantistoj elŝipiĝos ĉe Nov-Jorko, kaj de ĉi tiu urbo veturos al Washington per la fervojo. Escepte de unu alia, Nov-Jorko estas la plej popolita urbo en la mondo, kaj enhavas multajn unikajn vidindaĵojn. Oni devus vidi la tre altajn konstruaĵojn, unu el kiuj havas kvardek tri etaĝojn; la parkon lontan je kvin mejloj ĝuste en la centro de ĉi tiu urbejo. Sur la ekstera muro de unu alta konstruaĵo estas horloĝo kies diametro estas preskaŭ dek du metroj. La akvario de Nov-Jorko estas la plej bona en la mondo, eĉ pli bona ol tiu fama akvario en neapolo. Estas en Nov-Jorko multaj aliaj aferoj, kiuj estas vidindaj, inter kiuj estas la rimarkindaj subtervojoj en kiuj iras vagonaroj elektrikaj sub

la haveno kaj rivero de Nov-Jorko al la aliaj grandaj urboj Jersey City (ĝerzi siti) kaj Brooklyn (brukl'n).

Eminentaj Esperantistoj de diversaj landoj ĉeestos, kaj D-ro Zamenhof diris ke li certe venos. Decidu ke vi ankaŭ venos al Washington kaj partoprenos en la Sesa Kongreso. Skribu tuj kaj mendu vian kongreskarton, poŝtkartojn, markojn, kaj petu iun ajn deziratan scigon.

Adresu—Edwin C. Reed, Sekretario de la Sesa Kongreso de Esperanto, Washington, D. C., Untiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.

P. S. Oni povas pagi por karto. k. t. p., per ĉeko de la Ĉekbanko Esperantista.

УРОКЪ ВОСЬМОЙ

Окончания существительного и члена могут быть опущены и замѣнены апострофом; напр.: dom'—вместо domo; de l'mondo—вместо de la mondo.

ek—означает начало или мгновенность; напр.: kanti—пѣть, ekkanti—запѣть.

dis—раз- напр.: jeti—бросать, disjeti—разбрасывать.

—ebl—возможный; kredi—вѣрить, kredibla—вѣрjатный.

—ind—достойный; напр.: kredi—вѣрить, kredinda—достовѣрный;

—obl—вставка для числительныхъ множительныхъ; triobla—тройной.

—op—вставка для собирательныхъ; duope—вдвоемъ.

estr—начальникъ; напр.: ŝipo—корабль, ŝipestro—капитанъ.

—ĉj приставленное къ первымъ вѣсколькимъ буквамъ въ имени мужскомъ, а—dj въ женскомъ превращаютъ ихъ въ ласкательное; напр.: Petro—Петръ, Peĉjo—Петя; Mario—Марія, Manjo—Маша.

—ho—приобрѣтённый, бравома (своимъ или чужимъ); напр.: patro—отецъ, bo-patro—тестъ, сдекоръ.

—iŝ—имѣетъ неопредѣленное значеніе и употребляется въ тѣхъ случаяхъ, гдѣ мы чувствуемъ, что мы данное слово можемъ образовать изъ другого слова помощью суффикса, но ни одинъ изъ перечисленныхъ выше суффиксовъ для этого не подходитъ; напр.: plena—полный, plenumi—исполнять, malvarmigi—простудиться.

moŝto—общій титулъ; напр.: reĝo—король, Via Reĝa moŝto—Ваше Величество.

ԴՍՍ ՈՒԹԵՐՈՐԴ

Յանաի գոյական անունների և յօդերի վերջաւորիչ ձայնաւորները կրճատուած են. դա լինում է այն դէպքերում, երբ բարեհնչեանութիւնն է այդ պահանջում և կամ թէ ոտանաւորների մէջ աւելորդ վանկերի առաջն աննելու համար. կըրճատուած ձայնաւորը փոխարինուած է ապաթարցով ('). օր. dom' փոխանակ գրելու domo, de l'mondo փոխանակ գրելու—de la mondo և այլն:

ek—նշանակում է սկիզբ և կամ թէ սկսման սկընթարթը. օր. kanti—երգել, ekkanti—սկսել երգել և յանկարճ երգել:

dis—ցրուեն. օր. rompi—կտորել, disrompi—կտորատել, կտորել-ցրուել:

—ebl—կարելի լինելը. օր. fleksi—ճկել, fleksebla—ճկուն:

—ind—արժանի. օր. kredi—հաւատաւ, kredinda—արժանահաւատ:

—obl—ցոյց է տալիս թուական անունների բազմապատկումը. օր. triobla—երեք անգամ:

—op—ցոյց է տալիս թուական անունների հաւաքականութիւնը. օր. duope—երկսով:

—estr—պետ, վարիչ, կառավարիչ. օր. ŝipo—հաւ, ŝipestro—հաւապետ:

—ĉj—միանում է սովամարդկանց յատուկ անունների առաջին մի քանի տա-

ia-какой-то, *որիէ մէկ*, ვიღაც.
 voĉo-голосъ, *ձայն*, ձայն.
 milito-война, *պատերազմ*, Երկրորդ.
 movi-двигаться, *շարժուիլ*, թռնոտած.
 kompreni-понимать, *հասկանալ*, ըզըզ.
 kompati-сострадать, *ցաւակցիլ*, ցոցոց.
 ambaŭ-оба, *երկուսի*, Երկուսը.
 rakonto-рассказъ, *պատմութեամբ*, Թոտ.
 ŝiri-удивляться, *կարմանալ*, զայնորոշմ.
 fakto-фактъ, *փաստ*, Գրք.
 ŝipo-корабль, *հաւ*, զգծ.
 ĉiam-всегда, *միշտ*, Զուշ.
 kune-вмѣстѣ, *միասին*, Երեւ.
 okupi-занимать, *գրադուիլ*, ել յիտ զարտած.
 kolo-шея, *կիկ*, յոնց.
 kolumo-воротникъ, *վզնոց (պարանոցա-կալ)*, յոտոտեց.
 manŝo-манжета, *մանժետ*, Յանցոց.
 Kristo-Христосъ, *Քրիստոս*, յոտոց.
 kruco-крестъ, *խաչ*, խչոն.
 kruĉumi-распинатъ, *խաչել*, խչոցմ.
 fianĉo-женить, *նշանաբ.* Երջ.

НАШИМЪ ЧИТАТЕЛЯМЪ.

Этимъ номеромъ мы заканчиваемъ уроки языка Эсперанто, давъ все необходимое для изученіи его теоретически. Теперь же нужна практика. Въ нашемъ журналѣ мы помѣщаемъ анекдоты въ отдѣлѣ „Niŝogaĵa fakoj“: эти анекдоты при помощи словаря будутъ понятны новичкамъ. Кромѣ анекдотовъ, мы будемъ помѣщать также и другіе маленькіе рассказы для нашихъ новыхъ единомышленниковъ. Такимъ образомъ мало по малу они будутъ въ состояніи понимать все, написанное по-эсперантски и даже сами будутъ переводить на языкъ Эсперанто. Если что-либо будетъ непонятно; будутъ кое-какія затрудненія, то обратитесь въ редакцію и мы охотно дадимъ объясненія въ слѣдующемъ номерѣ. Присылайте намъ также ваши

литературныя „переводы“ и другія оригинальныя произведенія“; редакция исправитъ ихъ орфографически и стилистически и если найдутъ возможнымъ, то помѣститъ на страницахъ журнала. Наши совѣты, не беритесь съ начала же за большіе рассказы, а лучше поработать надъ маленькимъ рассказомъ и тщательно обработать его.

Умѣющий уже говорить по-эсперантски можетъ носить зеленую пятиконечную звезду, которая имѣетъ подобнае же значеніе (она стоитъ 35 к.). Каждый эсперантистъ долженъ считать своимъ долгомъ содѣлствовать распространенію Эсперанто. Нужно собираться въ кружки, открывать отдѣленія Кавказскаго Общества Эсперанто (объ этомъ въ слѣдующій разъ).

Изъ редакціи можно выписывать учебники и другія книги.

ՄԵՐ ԸՆԹԵՐՑՈՂՆԵՐԻՆ

Սոյն համարով մենք վերջացնում ենք թերթի մէջ մագլուղ դասերը, որովհետև արդէն տակն ենք այն, ինչ որ հարկաւոր է ամեն մի մարդու համար, որը ցանկութիւն ունի սովորել էսպերանտո լեզուն: Որքան այսուհետև ինչ է մնում, ինչ կերպ պիտի պարագին: Սոյն մասին մենք այստեղ կը տանք փորձիկ խորհուրդ, որ յուսով ենք օգտակար կը լինի: Մինչև այսօր եղած դասերն ունէին բառարան; որ բաւական օգնում էր սովորողին, բայց այսուհետև մնում է օգտուել բառարանից: Արդէն բառարանն էլ գոյութիւն ունի (էսպերանտո-հայերէն), յուսով կը լինի նաև հայերէն-էսպերանտո մասը և այդպիսով դորժ կը հնչումանայ, որովհետև էսպերանտո լեզուն միանգամայն հեռու է փիլիսոփայութիւններից:

Անցնեց շարունակելու ձևին: Մենք պիտիք բացի դասերից մի շարք անկ-

*) Нужно приложить марки, если хотите, чтобы рукопись была возвращена.

pretaj por labori pri fruhoma solidareco kaj aktiva amo al proksimumo kaj bono de la homaro. Tute logike, la Ordeno akceptis Esperanton, kiel plej efikan rimedon por rapidigi la atingon de sia grava celo. Pri detalaj sciigoj oni sin turnu al D-ro Fr. Uhlmann en Huttwil - Svisujo.

—La kuratoro de la Kaukaza lernej-regiono permesis malfermi en Stavropol kursojn de la lingvo Esperanto. Oni intencas malfermi la kursojn en Junio ŝu Aŭgusto de nuna jaro.

—En Duŝet (gub. de Tiflis) oni instruas la lingvon Esperanto en armena apudpregeja lernejo. Instruas loka armena pastro Husik Apreljan.

—Aperiĝ nova libro, ruse verkita de nia fervora samideano S-ro A. Arumov «Librotenado de kreditsocietaj bankoj» laŭ la duobla itala sistemo, 2 volumoj (teorio kaj praktiko) kun aldono de diversaj formoj, helpletoj k. ĉet. La aŭtoro estas fondinto de la «Dna. Tiflisa Societo de Reciproka Kredito». La libro estas tre utila por komercistoj. Adreso: Peterburgo, Ekateringofski per. 8.

—Gudauti (Suhuma distrikto) 22 de Junio 1910. Kun gojo mi povas sciigi al vi, ke ĉi tie estas esperantista grupo. Kvankam ĝi estas ankoraŭ nemultnombra, tamen la samideanoj estas fervoraj. Ni esperas konigi ĉi tie la ideon de Esperantismo, kaj disvastigi ĝin.

K. A. — jan

BIBLIOGRAFIO

Lingvaj Respondoj, aperintaj en la Revuo. Verkis D-ro L. L. Zamenhof, 1 vol. 80 paĝa; Paris, Hachette et Cie; prezo: Fr. 0,75.

Komencante de Decembro 1906, nia Majstro, per „La Revuo“ de tempo al tempo donadis al diversaj demandantoj

respondojn pri diversaj lingvaj demandoj. Tiuj leteroj havis karakteron tute privata tamen oni povas trovi en ili utiligajn konsilojn pri punktoj malfacilaj de grammatiko aŭ stilo de pra lingvo. Tial ni dankas nian Majstron, ke li aperigis tiun leteraron, kiel apartan broŝuron. Ĝi enhavas 55 zorgoplenajn respondojn kaj tial ĝi estas bona helpibro por ĉiu esperantisto.

Por ke oni povu facile trovi klarigojn pri ĉiu temo, «La Libro» estas aldona alfabeto registro.

—Havu, samideanoj, tiun ĉi utilan verkon.

—Preverbaro Esperanta, laŭ la verko „Frazologio“ rusa-pola-franca-germana de M. F. Zamenhof, aranĝis D-ro L. L. Zamenhof. 1 vol. 62 paĝa; Paris, Hachette et Cie; prezo: Fr. 1,80.

—Aperiĝ libro, enhavanta 1232 proverbojn.

—Proverbo estas produkto de la popola penso, popola imago. Ĝi estas ĝenerala opinio de unu rasoj aŭ gentoj. En la proverboj estas enkorpigita la popola spirito. Tial la „Proverbaro“ prezentas grandan intereson kaj la esperantistoj ĝin nepre legos.

—Pretigita kiel parto de verko kvinlingva, la „Proverbaro Esperanta“ estas aranĝita laŭ la alfabeto, ordo de tiu parto, kiu en la dirita verko (Frazologio rusa-pola) estas premita kiel bazo (la parte rusa). Sed por ke oni povu facile trovi la proverbojn, traktantajn pri ĉia dezirata temo, la laŭnhave dividitaj grupoj da proverboj estas numeritaj, kaj en la fino de la verko estas presita alfabeto registro de temoj, kiu montras de la numeroj, sub kiuj oni povas trovi ĉiun apartan temon.

—Por la lernantoj tiu ĉi libro ankoraŭ havas grandan utilon. Oni legos ĝin kun granda intereso kaj memoros multe da

vortoj kaj frazarangoj. La laboro estas
facila kaj agrabla. Tiu ĉi libro nepre havos bonan suk-
ceson.

Vardan Sirunjan



ՊՍՍՍԻԱՆԵՐ

Թ ու շ է թ . — Յ . ք . Աղբիւանցիւ .
Եթէ կամենում էք կանոնաւոր դասըն-
թացներ բանալ, այդ դէպքում պէտք է:
հաւաքուէք անուազն 10 հոգի, ինչպիսի զը-
րէք յանուն «Կովկասեան Էսպերանտո
Ընկերութեան», որը թոյլ կոայ ձեզ բա-
նալ տեղական ճիւղ և այն գամանակ
կարող էք կանոնաւոր դասընթացներ
բանալ: Տանավարի էլ կարող էք պարս-
պէլ իրբէ մասնաւոր անձ, որ տալիս է
որեւէ առարկայի դասեր: Գրքեր, դասա-
զրքեր և այլն կարող էք ստանալ խմբա-
գրութիւնիցս, վճար կանխիկ և վերադրը
վճարով (առայժմ ունենք ոսերէն և հա-
յերէն դասազրքեր): Աստղանշաններն ար-
ժեն 35 կոպէկ: Ճանապարհածախը
Դուք պիտի հոգաք:

Թ աւ ր ի զ . — Ա . Տ . Յ . Ցանկալի է, որ

Քարգիմիէր արձակ գրութեանը, մա-
նուանը եթէ հար է—պարսկերէնից:

Redaktoro-Eldonisto H. Ter-Astvacatrljanc

ANONCOJ

La Redakcio kaj Administrejo de
„KAŬKAZA ESPERANTISTO“
de la 1-a Julio transloĝigas sur Eliza-
vetinskajan str. domo de Prikaščikov
№ 17.

Редакция и контора газеты
«КАВК. ЭСПЕРАНТИСТЪ»
Съ 1-го Юля
переходить на Елизаветинскую
ул. д. Прикашикова № 17.

Պ Ա Տ Ա Ն Ի

Գ Ր Ա Վ Ա Ն Ժ Ա Ղ Ո Վ Ա Շ Ո Ւ

Բ. ԳՐԳՐՆՄԱՆԱՆԱԿՅԵԼ ցանկացող պա-
տանի-երիտասարդները իրանց աշխա-
տութիւնները պիտի ուղարկեն մինչև
օգոստոսի 15-ը, հետևեալ հասցէով
Tiflis, Vakhtangovskaja № 14, Misak Er-
rikiantz. (Roussie).

ՎԱՇՄԻՐՈՒ Ի Ա . ԳԻՔԸ, ԳՆԸ՝ 15 ԿՕԳ.

ВЪ РЕДАКЦИИ ЖУРНАЛА «KAŬKAZA ESPERANTISTO»

До 1-го Сентября

принимается подписка на

ПОЛНЫЙ РУССКО-ЭСПЕРАНТСКИЙ

С Л О В А Р Ъ

В. Сируняна

со многими объяснительными примѣрами. Цѣна до выхода въ свѣтъ въ Тифлисѣ
80 коп., а для мѣстнородныхъ подписчиковъ 1 р. съ пересылкой. Подписавшіеся на
10 экз. получаютъ 11-ый бесплатно.

Послѣ выхода изъ печати цѣна изданія будетъ повышена.

Ф
 О
 Т
 О
 -
 Д
 И
 К
 О
 Г
 Р
 А
 Ф
 И
 Я

Художественная



Ф
 О
 Т
 О
 -
 Д
 И
 К
 О
 Г
 Р
 А
 Ф
 И
 Я

С. А. СОГОМОНЯНА.

ИЗГОТОВЛЯЕТЪ

К Д И Ш Е

на цинкъ и мѣди для иллюстрированныхъ изданій и газетъ, прейсъ-курантовъ, газетныхъ объявленій, фирмовыхъ бланковъ, медалей, географич. картъ, плановъ, нотъ, fac-simile и пр. работы исполняются срочно.

Пушкинскій пассажъ, Тифлисъ.

Ս. ՍՈՂՈՄՈՆԵԱՆԻ ՊԱՏՐԱՅՈՒՄ Է ԿԼԻՇԵՆԵՐ գեղարևոտական
 Թերթերի, դասագրքերի և նման հրատարակու-
ՆՈՒՍԱՏՊԵՐՆԵՐ Թիւների, կարտերի, նոտաների, ձեռագրերի,
 (Ֆաքսիմիլէ), յայտարարութիւնների և այլն:
 Պատկերաւոր բաց-նամակներ 1000-ը 15 ղ. 2000-ը 25 ղ. և աւելին գեղջերով:

Вышла изъ печати книга

СЧЕТОВОДСТВО
Обществъ взаимнаго
кредита.

(Полное, по двойной системѣ).

Составилъ **А. АРУМОВЪ**, основатель Второго Тифлисскаго О-ва Взаимнаго Кредита.

Адресъ: Книгоизд. „Коммерческая Литература“, СПб., Елагинягофскій просп., № 8.
 3—1

La 15-an de Julio 1910 j.

Estos malfermita en Tiflis nova presejo «ESPERANTO»

Oni havos presliteraĵojn: esperantajn, rusajn, armenajn, kartvelajn, francajn k. t. p.

Adreso de la 1-a julio: Elizavetinskaja strato № 17, d. de Prikaščikov.

Съ 15 Юля 1910 года

Въ Тифлисъ открывъ новая типографія подъ фирмой

Эсперанто

Шрифты на языкахъ: эсперанто, русскомъ, армянскомъ, грузинскомъ, французскомъ и проч.

Адресъ съ 1-го Юля: Елизаветинская ул. д. Прикащикова № 17.

ՅՈՒԼԻՍԻ 15-ԻՑ 1910 Թ.

Թիֆլիսում բացվում է նոր տպարան

„ԷՍՊԵՐԱՆՏՕ“ ԱՆՈՒՆՈՎ

Կունենալ տատեր հետեւեալ լեզուներով.

Հայերանսո, անգլէն, ռուսերէն, ֆրանսերէն, արաբերէն և այլն: Եւ կառախ ամեն տեսակ պատուէրներ տպեմանուհան ցնորով:

Հասցեն յուլիսի 1-ից. Նիզամատինսկայա փող տուն Պրիկաշիկ-ի փող № 17.

15 ივლისს 1910 წ.

თბილისში გაიხსნება ახალი სტამბა

„ესპერანტო“ ფირმით

ქმნება ასევე ესპერანტულ, რუსულ, სომხურ, ქართულ და ფრანგულ ენებზედ.

შეასრულებს ყველა გვარ ზაკებებს ხელმისაწვდენ ფასებში. ადრესი ავღისის 1-დან: კლიზავეტინსკაის ქ., სახლი პრიკაშნიკოვის № 17.